

Enhavo

1	El la vivo de la “Societo pri Interlingvistiko” (GIL).....	2
1.1	La 23-a konferenco de GIL: “Interlingvistiko en la 21-a jarcento”	2
1.2	La 20-a volumo de la aktoj de GIL.....	3
2	El universitatoj kaj altlernejoj.....	4
2.1	John-Buchanan-Lekcioj en la Universitato de Liverpool (<i>Paul Gubbins</i>).....	4
2.2	Pri la estonteco de la amsterdama katedro (<i>Wim Jansen</i>)	4
2.3	Universitataj disertacioj	5
2.3.1	Bakalaŭra disertacio pri la germana Esperanto-movado de <i>Lisa Schmidt</i>	5
2.3.2	Bakalaŭra disertacio pri Esperanto de <i>Tereza Hujberová</i>	5
2.3.3	Doktora disertacio pri “falsaj amikoj” de tradukanto Hispana- Esperanto de <i>Maciej Jaskot</i>	5
3	Nova direktoro por la Kolekto de Planlingvoj kaj la Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko	6
4	Serĉata: helpo por disvolvi esplor-reton.....	6
5	Intervjuo kun <i>Timothy Reagan</i> , nova ĉefredaktoro de LPLP.....	7
6	<i>Christer Kiselman</i> – Nova Prezidanto de la Akademio de Esperanto	8
7	Aktuala Bibliografio 2	8
8	Libro-ofertoj	15
8.1	Manuskripto pri Volapük	15
8.2	Reduktitaj prezoj por Esperanto-vortaroj por germanoj	15
9	Korektaĵoj pri artikolo en la festlibro por <i>Helmar Frank</i>	16



1 El la vivo de la „Societo pri Interlingvistiko“ (GIL)

1.1 La 23-a konferenco de GIL: „Interlingvistiko en la 21-a jarcento“

Sendube „Interlingvistiko en la 21-a jarcento“ kiel kadra temo de la 23-a konferenco de Gesellschaft für Interlinguistik“ (GIL), t.e. Societo pri Interlingvistiko, estas tre vasta kaj neniel kontentige traktebla dum unu konferenco. Tamen la 23-a konferenco, kiu okazis de 29.11.-1.12.2013 en Berlin, estis denove interesa kaj stimula. Ĝin partoprenis 37 personoj, inter ili el Belgio, Ĉinio (Hongkong), Italio, Hispanio (Katalunio) kaj Hungario.

Oni prezentis jenajn prelegojn:

Detlev Blanke (Berlin)

Kompetent urteilen? Wege zur Fachinformation über Plansprachen (Kompetente juĝi? Vojoj al faka informado pri planlingvoj)

Kristin Tytgat (Libera Universitato Bruselo)

Brüssel, die Hauptstadt Belgiens: eine offiziell zweisprachige, aber in der Realität mehrsprachige Stadt (Bruselo, la ĉefurbo de Belgio: urbo oficiale dulingva, sed reale plurlingva)

Bernhard Pabst (Berlin)

Das Fundamento de Esperanto – noch bedeutsam im 21. Jh.? (La Fundamento de Esperanto – ankoraŭ grava en la 21-a jarcento?)

Rudolf Fischer (Universitato Münster)

Die Bedeutung der Vokale -a-, -i- und -o- in finiten Verbformen und Partizipien des Esperanto (La signifo de la vokaloj -a-, -i- kaj -o- en finitivaj verbformoj kaj participoj de Esperanto)

Sabine Fiedler (Universitato Leipzig)

Gender im Esperanto (Genro en Esperanto)

Ulrich Lins (Bonn)

Für Esperanto, gegen die Juden. Die Widersprüche des Albert Steche (Por Esperanto, kontraŭ la judoj. La kontraŭdiroj de Albert Steche)

Vera Barandovská-Frank (Paderborn):

Zu Definitionen von Interlinguistik in Wikipedien (Pri la difinoj de ‚interlingvistiko‘ en Vikipedioj)

László Maráczy (Universitato de Amsterdam):

Einige Gedanken über Geopolitik und Linguae Francae im 21. Jahrhundert (Kelkaj pensoj pri geopolitiko kaj lingvafrankoj en la 21-a jarcento)

Claus Killing-Günkel (Köln)

Sprachschöpfung in der Koniologie, einem neuen Feld der Algebra (Lingvokreado en la koniologio, nova kampo de algebro)

Sabine Fiedler (Universitato Leipzig)

Vorstellung neuer Fachliteratur aus interlinguistischer Sicht (Prezento de nova fakliteraturo laŭ interlingvistika vidpunkto)

Jürgen Nowak (Berlin)

Vorstellung des Projektes Sprachmuseum Berlin (Prezento de la projekto pri lingvo-muzeo en Berlino)

Kristin Tytgat (Libera Universitato Bruselo)

Sprachanforderungen an belgische Professoren (Lingvaj postuloj al belgaj profesoroj)

Krom tio sub gvido de *Cornelia Mannewitz* (Universitato Greifswald) okazis vigla podia diskuto pri la problemoj de normo en la planlingvo Esperanto (kun *Rudolf Fischer*, *Cyril Brosch* kaj *Bernhard Pabst*). Kiel kutime *Johann Pachter* prezentis riĉan libro-oferton. *Detlev Blanke* ekspoziciis novajn titolojn de fakliteraturo. La prelegojn filmis *Sebastian Kirf*.

1.2 La 20-a volumo de la aktoj de GIL

Brosch, Cyril/ Fiedler, Sabine (2013, red.): Plansprachen – ideengeschichtliche Aspekte. Beiträge der 22. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23. – 25. November 2012 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 20. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 117 p., 10 EUR. (Ideo-historiaj aspektoj de planlingvoj).

Enhavo

Sabine Fiedler / Cyril Brosch Einleitung (Enkonduko)

Velimir Piškorec Inter- und Ökolingustik im Vergleich: Ansätze, Traditionen, Schnittstellen (Inter- kaj ekolingvistiko en komparo: elirpunktoj, tradicioj, interkruciĝoj)

Cyril Brosch Die Indogermanistik und die Plansprachenfrage – eine flüchtige Bekanntschaft (La hindoeŭropistiko kaj la planlingva demando – supraĵa interkonatiĝo)

László Marác János Bolyai und das Ungarische als perfekte Sprache (János Bolayai kaj la hungara kiel perfekta lingvo)

Goro Christoph Kimura Hat Esperanto eine Innere Idee? – Eine Betrachtung aus Sicht der Sprachideologie (Ĉu Esperanto havas Internan Ideon? – lingvo-ideologia rigardo)

Helen Geyer Sprachpolitik und -praxis in Andorra (Lingvopolitiko kaj –praktiko en Andoro)

Toon Witkam Plansprachen: zukunfts geschichtliche Aspekte für das 21. Jahrhundert (Planlingvoj: estontechistoriaj aspektoj por la 21-a jarcento)

Louis F. von Wunsch-Rolshoven Die Verbreitung von Ideen entsprechend dem Modell „Diffusion of Innovation“ (Everett Rogers), angewandt auf die Verbreitung des Esperanto (La disvastigo de ideoj laŭ la modelo „Diffusion of Innovation“ [Everett Rogers], aplikata al la disvastigo de Esperanto)

Goro Christoph Kimura / Sabine Fiedler Interlinguistisch relevante Fachliteratur 2011/2012 (Interlingvistike grava faka literaturo 2011/2012)

2 El universitatoj kaj altlernejoj

2.1 John-Buchanan-Lekcioj en la Universitato de Liverpool

En la jaro 1930 skota kuracisto, *d-ro John Buchanan*, testamentis al la Universitato de Liverpool, Britio, kvar mil pundojn (hodiaŭa ekvivalento ĉ. ducent mil pundojn, aŭ 236 000 eŭrojn).

Buchanan, kiu ĉeestis plurajn universalajn kongresojn dum la 1920aj jaroj, volis, ke la mono estu uzata por “disvastigi kaj instrui” Esperanton kaj por “stimuli sciojn” pri la lingvo ĉe la universitato en urbo, kie li laboris kiel juna kuracisto.

Dum sekvaj jardekoj la fonduso subtenis eminentajn esperantistojn, i.a. *William E. Collinson*¹, profesoro pri la germana lingvo ĉe la universitato, kiu verkis gravajn interlingvistikajn studojn kaj krome laŭ la testamento de Buchanan instruis la internacian lingvon.

Pliaj detaloj, parenteze, kaj pri Buchanan kaj pri Esperanto ĉe la universitato, legeblas en lastatempe eldonita libro verkita de *Angela Tellier*, la motoro de la lerneja instruprojekto *Springboard*. La angalingvan libron *John Buchanan ... an Esperanto legacy to the University of Liverpool* eldonis Esperanto-Asocio de Britio.

En la lastaj jaroj, tamen, oni interpretis la testamenton pli larĝe. Ĉiusemajnaj instruhoroj ĉe la universitato, kiuj allogis fine nur manplendon da studentoj, dum britaj kongresoj estis anstataŭigitaj per prelegoj en Esperanto, ĉiam aŭspiciataj de la universitato.

Ekde 2009 la prelegoj revenis al la universitato, kiam *profesoro Wim Jansen*, de la Esperanto-katedro ĉe la Universitato de Amsterdamo, prelegis, denove ĉi-fojon en la angla, pri “La esperanta projekto”.

En oktobro 2013 *Wim Jansen* revenis al Liverpoolo kun sia posteulo ĉe la amsterdama katedro, *Federico Gobbo*.

Jansen prelegis pri “Lingva degradiĝo, forvelkado, morto, revivigo. Kiel inversigi tiun tendencon?” En sia prelego li malkonsentis kun *David Crystal* pri la neceso konservi lingvan diversecon paralele al la neceso konservi biologian diversecon. Li klarigas, ke tiu ŝajne simpatia argumento baziĝas sur miskompreno de la darvina evoluteorio.

La deirpunkto de *Federico Gobbo* estis “Esperanto kaj minoritataj lingvoj: defioj kaj ŝancoj”. Li konsideris, kio estas minoritata lingvo kaj konkludis, ke tia ne estas Esperanto. Ne troveblas difinita areo, en kiu Esperanto estas subpremata de majoritata lingvogrupo. Tamen tio ne implicu, ke ne ekzistas soci-lingvistikaj similaĵoj inter Esperanto kaj minoritataj lingvoj.
(Laŭ *Paul Gubbins*)

2.2 Pri la estonteco de la amsterdama katedro

Wim Jansen

La 11-an de aprilo 2013 la kuratoraro unuanime rekomendis al la dekanato de la humanisma fakultato, ke Universitato de Amsterdam ebligu la nomumon de *d-ro Federico Gobbo* el Italujo kiel specialan profesoron por la periodo de novembro 2013 al novembro 2018. La definitiva nomumo kaj profesorigo de Gobbo sekvos post la aprobo de la rekomendo fare de la estraro de la Universitato.

Mi mem ricevis la proponon resti ligita dum pliaj kvin jaroj al la Universitato kiel ‘emerita esploristo’, kun laborloko (dividota kun aliaj emeritoj), alireblo al la biblioteko kaj interna universitata reto, plua disponeblo de universitata retadreso kaj laŭokaze aliaj privilegioj. Unu mia projekto, kiun la universitato volonte apogas, estas la bibliografia laboro pri interlingvistiko kaj esperantologio por la usona *Modern Language Association* MLA. Krom tio, mi planas plu dediĉi tempon al la priskribo de la Esperanta gramatiko laŭ la modelo de la

¹ http://en.wikipedia.org/wiki/William_Edward_Collinson. (06.12.2013).

Funkcia Diskurs-Gramatiko. Jam antaŭvidata paŝo sur tiu tereno estas la diskutigo kaj defendo de mia 30-paĝa kontribuo por la ateliero en Vieno (vidu supre) pri la sistemoj de derivado kaj kunmetado en Esperanto kaj, espereble, la sekva ellaboro de artikolo por esperantista aŭ neesperantista faka gazeto.

(El: „La Amsterdama Katedro“, n-ro 23 [3/2013], septembro, p. 9)

2.3 Universitataj disertacioj

2.3.1 Bakalaŭra disertacio pri la germana Esperanto-movado de *Lisa Schmidt*

Schmidt, Lisa (2013): Esperanto: von der Entstehung bis zur heutigen Situation am Beispiel der deutschsprachigen Esperanto-Gemeinschaft. Mainz: Universität Mainz Translationswissenschaft Germersheim, IV, 113 S. (Esperanto: de la estiĝo ĝis nuntempa situacio ĉe la ekzemplo de la germanlingva Esperanto-komunumo)

(Tre bona studo. Aparte interesa estas la sociologia enketo inter germanaj esperantistoj, ekde p. 52) Kontakto: slisa@students.uni-mainz.de

2.3.2 Bakalaŭra disertacio pri Esperanto de *Tereza Hujberová*

Hujberová, Tereza (2013): Umělé jazyky se zaměřením na esperanto. (Künstliche Sprachen mit Hinblick auf Esperanto). Brno: Masaryk-Universität, Philosophische Fakultät, Sprachwissenschaft und baltische Sprachen, 70 S. (artefaritaj lingvoj rigarde al Esperanto)

2.3.3 Doktora disertacio pri „falsaj amikoj“ de tradukanto Hispana-Esperanto de *Maciej Jaskot*

Jaskot, Maciej Paweł (2013): *Los asíllamados falsos amigos del traductor entre el Español y el Esperanto.* Warszawa: Universidad de Varsovia, Facultad de Lenguas Modernas, Instituto de Estudios Ibéricos e Iberoamericanos (Tesis doctoral bajo la dirección del Prof. Dr. hab. Jacek Perlin), 340 p. (La tiel nomataj falsaj amikoj de la tradukisto inter la hispana kaj Esperanto). Kontakto: maciej.jaskot@gmail.com

Resumo

La disertacio estiĝis pro la intereso de la aŭtoro pri leksikaj fenomenoj observeblaj inter similaj lingvoj. Unu el la ĉefaj celoj de la esploro estis pretigi vortaron de falsaj amikoj inter Esperanto kaj la hispana.

La metodo de la prilaboro de la vortaro estas baza. Estis selektitaj esperantaj vortoj, kiuj laŭ la aŭtoro, pro siaj grafika aŭ akustika formo, povas konfuzigi parolanton de la hispana. La aŭtoro estas konscia, ke la proponita elekto koncernas *eblajn* falsajn amikojn pro tio, ke oni disponas pri neniam studoj konfirmantaj kiom ofte ripetiĝas la misapliko de iu esperanta vorto uzita kun hispandevena signifo. Tamen, la aŭtoro konsideras, ke la vortokonsisto de la vortaro povas helpi eviti erarojn kaj esti utila ilo por ĉiuj dezirantaj plibonigi sian lingvokapablon de Esperanto.

La disertaĵo konsistas el kvar ĉapitroj:

La *unua* prezentas superrigardon de planlingvoj kaj Esperanto mem kaj celas pruvi ke la lingvo de Doktoro Zamenhof estas plene evoluinta lingvosistemo, kiu dank'al sia karaktero *a posteriori*, enkorpiginte gramatikajn solvojn de aliaj naciaj lingvoj, povas esti komparata kun la hispana.

La *dua* ĉapitro traktas la fenomenon de falsaj amikoj de la tradukisto prezentante koncize diversajn klasifikoproponojn de tiaj vortoj kaj ilian funkciadon en la lingva sistemo.

En la *tria* ĉapitro oni parolas pri la redaktado de unulingva vortaro de Esperanto kaj pri la klasifiko de falsaj amikoj elektita de la aŭtoro.

En la *kvara*, kaj lasta, ĉapitro oni prezentis la konkludojn de la traktita temo.

Fine, troveblas la vortaro de falsaj amikoj kaj du apendicoj: unu kun teksto de la “Fundamento de Esperanto” (16 reguloj) kaj la alia, kun la teksto de la rezolucioj de UNESKO (1954,1985, projekto de 1993) pri la lingvo Esperanto. Sekvas ampleksa bibliografio. (Laŭ la Resumo sur p. 326)

3 Nova direktoro por la Kolekto de Planlingvoj kaj la Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko

La direktoro de la Literatura Arkivo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, *privata docento doktoro Bernhard Fetz*, transprenis je la 1-a de aŭgusto 2013 ankaŭ la direktorecon de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. En tiu funkcio li sekvas kortegan konsiliston *magistro Herbert Mayer*, kiu fine de julio 2013 emeritiĝis. Inter la plej gravaj evoluoj dum la oficperiodo de direktoro Mayer, ekde 1988, estas la translokiĝo de la kolekto kaj de la muzeo al la Palais Mollard, la novkonceptado de la Esperanto-Muzeo kaj la komenco de la ampleksaj ciferecigoj de la biblioteka kaj muzea havaĵoj.

La komuna gvidado de la Literatura Arkivo kaj de la Kolekto por Planlingvoj, kiu restos ankaŭ estontece memstara je la kutima loko en la Palais Mollard, ebligas valorajn kaj riĉigajn sinergiojn en enhava kaj arkiva rilatoj: Ambaŭ kolektoj dokumentas la 20-an jarcenton, precipe la intermilitan periodon, kaj diversajn aspektojn de lingvofilozofio. Ankaŭ rilate la praktikan arkivlaboron rezultiĝas multnombraj punktoj de kontakto pro la similaj objekto-tipoj en modernaj postlasaĵoj.

Krome *magistro Bernhard Tuidier*, fakulo sur la kampo de esperantologio kaj longjara kunlaboranto, estis nomumita teamestro. Li gvidas la laborojn en la interlingvistika fakbiblioteko kaj deĵoras kiel unua kompetenta fakulo por interesatoj kaj fak kolegoj.

La Kolekto de Planlingvoj kaj precipe la Esperanto-Muzeo ankaŭ estonte estos vivanta loko de renkontoj por ĉiuj, kiuj interesiĝas por niaj havaĵoj, muzeaj gvidadoj kaj kursoj.

Por demandoj:

Mag. Bernhard Tuidier, bernhard.tuidier@onb.ac.at, T +43 1 53410-731

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen.htm>

<http://www.onb.ac.at/esperantomuseum.htm>

4 Serĉata: helpo por disvolvi esplor-reton

La usona esplorfondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF) serĉas part-tempan Akademian Kunordiganton kiu proksime kunlaboros kun estraranoj kaj stabanoj por disvolvi akademian komunumon kaj esplor-reton pri interlingvistiko, en Nord-Ameriko kaj alikontinente.

La taskaro inkluzivas varbadon kaj korespondadon, la evoluigon de esploroj (retpaĝoj, bibliografioj, k.s.), kaj konsiladon al la estraro pri promesplenaj iniciatoj kaj evoludirektoj.

Bonega kono de la angla estas nepre; kapabloj en Esperanto estas tre dezirindaj, same kiel konoj pri unu aŭ pluraj aspektoj de interlingvistiko (ekz. lingvopolitiko kaj lingvoplanado, interkultura komunikado, transnaciaj sociologio kaj historiografio, kaj simile).

Ni volonte ricevas kandidatiĝojn de studentoj postdiplomaj, same de homoj kun postdiploma kvalifiko en parenca fako. Bonvenus pruvitaj spertoj pri esplorretoj je nacia aŭ internacia nivelo, same kiel konoj pri la planado kaj ellaboro de retoj kaj datumbazoj. Horojn kaj rekompencon oni fiksos interkonsente kaj surbaze de kvalifikoj kaj spertoj. Por kandidatiĝi, bonvolu rigardi la plenan postenpriskribon ĉe <http://esperantic.org/en/research/internship>

5 Intervjuo kun *Timothy Reagan*, nova ĉefredaktoro de *LPLP*

Okaze de lia vizito al Amsterdamo en majo 2013 por diskutoj kun la eldonejo John Benjamins, ni kaptis la okazon intervjui la novan ĉefredaktoron de *LPLP*. La kariero de *Profesoro Timothy Reagan* inkluzivis ne nur la kutimajn agadojn de tre sukcesa usona instruanto kaj verkisto pri lingvoj kaj lingvaj demandoj (ĉefe rilate lingvon kaj edukadon), sed ankaŭ estraranecon en *Esperantic Studies Foundation*, periodon de instruado en Universitato Gallaudet (la usona universitato por surduloj), lastatempan dekanecon en la Universitato Witwatersrand en Sudafriko, kaj nun dekanecon en la nova fakultato pri edukado ĉe la Universitato Nazarbajev en Kazahio. Li havas internacian reputacion pro siaj kontribuoj al la studado de kompara edukado (precipe rilate okcidentstilan kaj islaman edukadon), de gestolingvoj, kaj de lingvoinstruada metodiko. Li plurfoje kontribuis al simpozioj kaj konferencoj organizitaj de CED, plej laste en la Nitobe-simpozio 2013 en Rejkjaviko.

IpI: Kiun imagon vi havas pri la estonta evoluo de *LPLP*?

T.R.: Unue: esence daŭrigi la jam establitan vojon: insisti pri alta nivelo de faka kaj scienca kvalito, kaj roli kiel ekzemplo de tio, kion oni povus kaj devus atingi sur la tereno de lingvo-planado kaj lingvaj problemoj. Due, daŭrigi la multlingvan politikon de *LPLP* per aperigo de artikoloj ankaŭ en aliaj lingvoj ol la angla, kaj samtempe doni apartan atenton al interlingvistiko kaj Esperanto – kaj daŭrigi aperigon de resumoj en Esperanto.

Samtempe, tamen, mi ŝatus plilarĝigi nian legantaron kaj nian publikan bildon por pli sisteme enpreni aplikan lingvistikon kaj sociologion. Gravas, ke fakuloj en apudaj disciplinoj komprenu la gravecon de la lingva dimensio de siaj studobjektoj. Tro ofte en aliaj socisciencaj disciplinoj oni agas kvazaŭ lingvaj diferencoj ne ekzistus.

IpI: Kiujn planojn vi havas rilate la redaktan komitaton?

T.R.: La ŝanĝo de ĉefredaktoreco donas okazon por reipensi niajn labormanierojn ĝenerale – kaj ankaŭ la konsiston kaj utiligon de la redakta komitato. Ni povus uzi elektronikajn rimedojn por resti en pli regula kontakto. Fakte, utiligo de nove ekzistantaj elektronikaj rimedoj estos unu el la prioritatoj.

IpI: Vi esprimis vian pozitivan opinion pri la multlingva karaktero de la revuo. Ĉu ne estas malfacile teni tiun karakterizon fronte al la ĉiam plifortiĝanta rolo de la angla?

T.R.: Persone mi estas absolute konvinkita, ke *LPLP*, kiel unu el la malmultaj fakaj revuoj, kiuj bonvenigas kaj varbas artikolojn en aliaj lingvoj, restu firme ligita al tiu celo. Kompreneble, ni samtempe estu realismaj pri la fakto, ke aŭtoroj estas ofte sub premo verki en la angla, kaj ankaŭ ke revuo kiu tro forte emfazas sian multlingvecon, koste de ĉio alia, riskas perdi legantojn. Temas pri kompromiso inter maksimuma multlingveco unuflanke kaj maksimuma scienca utilo aliflanke.

IpI: Kaj viaj pensoj pri Esperanto?

T.R.: Kvankam mi iom hezite parolas la lingvon, mi bone komprenas ĝin – kaj inter miaj apartaj fakaj interesoj (pri kio mi multe verkis) estas lingvaj fenomenoj foje rigardataj de miaj kolegoj kiel ekster la ĉefa fluo, ekzemple gestolingvoj. Mi aparte interesiĝas pri la instruado kaj lernado de Esperanto kaj ĝia pli vasta utiligo, kaj mi subtenas la celojn de la lingvo-komunumo

IpI: Dankon pro la intervjuo!

6 *Christer Kiselman* – Nova Prezidanto de la Akademio de Esperanto

Profesoro Christer Kiselman [prononcu: Ĉiselman] el la Matematika Instituto de la Upsala Universitato (Svedio) estas elektita kiel la nova prezidanto de la Akademio de Esperanto (AdE) rezulte de la voĉdonado de 37 akademianoj.

Christer Kiselman ekde 1989 estas membro de AdE; lastatempe li oficis en AdE kiel direktoro de la sekcio pri faka lingvo kaj membro en la sekcioj pri gramatiko, pri la ĝenerala vortaro kaj pri prononco. En Esperantujo li estas konata ankaŭ pro la organizado de *esperantologiaj konferencoj* en la Universalaj Kongresoj, pro redaktado de la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies* kaj pro la multaj prelegoj kaj artikoloj pri temoj esperantologiaj.

La nova estraro de AdE estas kvarpersona:

Christer Kiselman, prezidanto
Probal Dasgupta, vicprezidanto
Brian Moon, vicprezidanto
Renato Corsetti, sekretario

Kiel direktoroj estis elektitaj:

Sergio Pokrovskij, Faka Lingvo
Bertilo Wennergren, Gramatiko
Markos Kramer (germane Marcos Cramer), Ĝenerala Vortaro
Anna Löwenstein, Kontrolado de lerniloj
Alexander Schlafer, Lingva Konsultejo
Paul Gubbins, Literaturo
Probal Dasgupta, Prononco
Carlo Minnaja, Komisiono Historio de AdE
Nguyen Xuan Thu, Komisiono pri homaj nomoj

Profesoro Kiselman prezentis kvar proponojn por la laborplano de la Akademio. La unua estas priskribo de la lingvo Esperanto. Li prezentas ĝin jene: “Mi volas provi prezenti pli taŭgan priskribon de Esperanto, se eble kun helpo de elstaraj lingvistoj sendepende de tio, ĉu ili membras en AdE au ne”. (Laŭ Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 21). (http://www.akademio-de-esperanto.org/oficialaj_informoj/oficialaj_informoj_21_2013.html)

7 **Aktuala Bibliografio 2**

En IpI n-ro 86 (3/2013) ni prezentis la unuan sekvon de la Aktuala Bibliografio. Jen sekvas la dua.

→ entenata en....
red. redaktita/eldonita de
p. paĝo(j)

Ammon, Ulrich (2012): „Die Nischenfächer für Deutsch als internationale Wissenschaftssprache und die Zukunftsperspektive.“→*Quo vadis romania? QVE*, Nr. 40/2012, p. 39-61.

Amouroux, Jean (2013): „La akĉento de Zamenhof.“→*La Gazeto* 28 (2013) n-ro 165, p. 22.

Amouroux, Jean (2013): „La akuzantoj englutu sian ĉapelon.“→*Heroldo de Esperanto* 8/2013 (2207), p. 3 (pri de Beaufront).

- Amouroux, Jean (2013): „La lasta revo de Beaufront.“→*Esperanto* 106 (2013) n-ro 1269 (5/2013) p. 106.
- Baláž, Peter (2013): „La plej freŝaj aktivadoj de E@I en la kampo de edukado.“→Katarína Nosková, Peter Baláž (2013, red.): *Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj*. KAEST 2012. Partizánske: Espero, p. 9-14.
- Becker, Ulrich (2013): „La princo ĉe la ŝiungnuoj kaj aliaj literaturteoriaj bagateloj.“→*Beletra Almanako* 18, p. 102-114 (i.a. pri la kvalito de recenzoj en Esperanto).
- Blahuš, Marek (2013): „Vikipedio – kiel funkcias la libera enciklopedio?“→Katarína Nosková, Peter Baláž (2013, red.): *Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj*. KAEST 2012. Partizánske: Espero, p. 21-29.
- Blahuš, Marek (2013): „Cifereca prilaboro de la Zamenhofaj adresaroj.“→Katarína Nosková, Peter Baláž (2013, red.): *Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj*. KAEST 2012. Partizánske: Espero, p. 163-172.
- Blanke, Detlev (2013): „Kion fari pri esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj?“→*La Gazeto* 28 (2013) n-ro 165, p. 15-19; n-ro 166, p. 8-13.
- Blanke, Wera (2013): *Pri terminologia laboro en Esperanto. Elektitaj publikaĵoj*. (Redaktis Detlev Blanke), New York: Mondial, 318 p.
- Brosch, Cyril (2013): „Die Indogermanistik und die Plansprachenfrage – eine flüchtige Bekanntschaft.“→Brosch, Cyril/ Fiedler, Sabine (2013, Red.): *Plansprachen – ideengeschichtliche Aspekte*. Beiträge der 22. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23. – 25. November 2012 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 20. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., [117 p.], p. 33-43.
- Brosch, Cyril/ Fiedler, Sabine (2013, Red.): *Plansprachen – ideengeschichtliche Aspekte*. Beiträge der 22. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23. – 25. November 2012 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 20. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 117 p.
- Camacho, Jorge (2013): „Vortoj en vortaroj.“→*Beletra Almanako* 18, p. 65-71.
- Cherpillod, André (2013): *La FUNDAj...koMENTOj. Kolekto da lingvaj artikoloj*. Courgenard: La Blanchetière, 109 p.
- Cherpillod, André (2013): *Muzika leksikono*. Courgenard: La Blanchetière, 61 p.
- Chrdle, Petr (2013): *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj*. (Tria aktualigita eldono) Dobřichovice: KAVA-PECH, 97 p.
- Colling, Ivan Eidt (2013): „Lejbnico: algebre lingvumi, kalkule rezoni.“→*Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/Humankybernetik (grkg)* 54 (2013), n-ro 3, p. 129-145.
- Derks, Johan (2013): „Pravigeblaj kaj ne-pravigeblaj uzoj de la ŝajnsufikso –iz.“→<http://lingvakritiko.com/2013/06/07/pravigeblaj-kaj-ne-pravigeblaj-uzoj-de-la-shajnsufikso-iz/>

Derks, Johan (2013): „Kiom internacia estas mia vorto?“

→<http://lingvakritiko.com/2013/06/28/kiom-internacia-estas-mia-vorto/>

Derks, Johan (2013): „La signifo de derivado de landnomoj kaj etnonomoj en fremdaj lingvoj por la valideco de la Zamenhofa sistemo. Sugestoj pri politikaj kaŭzoj de ĝia koruptiĝo.“

→ <http://lingvakritiko.com/2013/07/04/293/>

Dopart, Bogusław / Bobran, Sabina (2013): „La pola kulturo en la tempo de Ludoviko Zamenhof, prilumita de la fenomeno de akceptado de ‚Sinjoro Tadeo‘ de Adam Mickiewicz“.

→*Esperantologio. Esperanto Studies (EES)*, kajero 6 (2013), p. 59-69.

Earls, Clive W. (2013): „Setting the Catherine wheel in motion. An exploration of „Englishization“ in the German higher education system.“→*Language Problems & Language Planning* 37 (2013)2, p. 125-150.

Erasmus, Hans (2013): „La amsterdama katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto.“

→*Esperanto* 106 (2013) n-ro 1271 (7-8/2013) p. 150-151.

Gazzola, Michele / Grin, François (2013): „Is ELF more effective and fair than translation? An evaluation of the EU’s multilingual regime.“→*International Journal of Applied Linguistics* 23 (2013), 1, p. 93-107.

Geller, Ewa (2012): „Die vielfach verkannte Jiddische Grammatik des Ludwik Zamenhof.“→*Jiddistik heute. Yiddish Studies Today*. Band 1, Düsseldorf: düsseldorf university press, p. 393-414.

Geyer, Helen (2013): „Sprachpolitik und -praxis in Andorra.“→Brosch, Cyril/ Fiedler, Sabine (2013, Red.): *Plansprachen – ideengeschichtliche Aspekte*. Beiträge der 22. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23. – 25. November 2012 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 20. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., [117 p.], p. 67-75.

Goes, Heidi (2013): „Esperanto-movado en Indonezio: ĉu io lastatempa?“→Kiselman, Christer/Maradan, Mélanie (2013, red.): *Leksikologio, frazeologio, historio, semantiko kaj terminologio: du kontinentoj renkontiĝas en Hanojo*. Aktoj de la 35-a Esperantologia Konferenco en la 97-a Universala Kongreso de Esperanto, Hanojo 2012. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 23-33.

Grimley Evans, Edmund (2013): „Malpliigi pretervidojn kaj misavertojn de esperanta literumilo per eraromodelo.“→*Esperantologio. Esperanto Studies (EES)*, kajero 6 (2013), p. 45-57.

Haberland, Hartmut/ Schulte, Klaus (2008): „Deutsch als Wissenschaftssprache.“→Michael Svendsen Pedersen, Hartmut Haberland (Red., 2008): *Sprogliv – Sprachleben. Festschrift für Karen Sonne Jakobsen*. Roskilde: Roskilde Universitetscenter, p. 123-133.

Hauptenthal, Irmi / Hauptenthal, Reinhard (2013): *Auswahlbibliographie zur Interlinguistik und Esperantologie. Selektita bibliografio pri interlingvistiko kaj esperantologio*. Bad Bellingen: Edition Iltis, 60 p.

Janičić, Dimitrije (2013): „Cent jaroj de originala Esperanto-literaturo en Serbio.“→Lipari, Michela/ Tonkin, Humphrey kaj aliaj (2013): *Belarta rikolto 2013*. New York: Mondial, p. 64-82.

- Jansen, Wim (2013): „Radikoj kaj vortoj en esperanto.“→*Esperantologio. Esperanto Studies (EES)*, kajero 6 (2013), p. 6-43.
- Jansen, Wim (2013): „The learnability of the reflexive in Esperanto.“→*Esperantologio. Esperanto Studies (EES)*, kajero 6 (2013), p. 71-96.
- Jansen, Wim (2013): „Esperanto parts of speech in functional discourse grammar.“→*Linguistics* 51 (2013) 3, p. 611-652.
- Jansen, Wim (2013): *Natuurlijke evolutie en leergemak. Aspecten van verandering in het Esperanto*. Rotterdam: Esperanto Nederland, 22 p.
- Jansen, Wim (2013): „Waringhien pri vortoj. ‘Lingvo kaj vivo’ revizitata post pli ol duona jarcento.“→*Beletra Almanako* 18, p. 72-88.
- Jermolowicz, Renata (2003): „On the Project of a Universal Language in the Framework of the XVII Century Philosophy.“→*Studies in Logic, Grammar and Rhetoric* 6 (19) p. 51-61.
- Johansson, Sten (2013): *Kroze – proze. Literatura esearo*. Stockholm: Sten Johansson kaj Eldona Societo Esperanto, 158 p.
- Kadoja, Hidenori (2013): „Dekonstruado de esperanta frazeologio.“→Christer Kiselman, Mélanie Maradan (2013, Red.): *Leksikologio, frazeologio, historio, semantiko kaj terminologio: du kontinentoj renkontiĝas en Hanojo*. Aktoj de la 35-a Esperantologia Konferenco en la 97-a Universala Kongreso de Esperanto, Hanojo 2012. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 15-21.
- Kimura, Goro Christoph (2013): „Hat Esperanto eine Innere Idee? – Eine Betrachtung aus Sicht der Sprachideologie.“→Brosch, Cyril/ Fiedler, Sabine (2013, Red.): *Plansprachen – ideengeschichtliche Aspekte*. Beiträge der 22. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23. – 25. November 2012 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 20. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., [117 p.], p. 57-66.
- Kiselman, Christer (2013): „Paul Neergaard kaj lia revuo Esperantologio 1949-1961 (Paul Neergaard and his journal Esperantologio 1949-1961).“→*Esperantologio. Esperanto Studies (EES)*, kajero 6 (2013), p. 44.
- Koutny, Ilona (2013): „Kiel ni aj pensoj vortiĝas? Kiun semantikan modelon sekvas Esperanto?“→Christer Kiselman, Mélanie Maradan (2013, Red.): *Leksikologio, frazeologio, historio, semantiko kaj terminologio: du kontinentoj renkontiĝas en Hanojo*. Aktoj de la 35-a Esperantologia Konferenco en la 97-a Universala Kongreso de Esperanto, Hanojo 2012. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 35-48.
- Krause, Bernd (2013): „125 Jahre Esperanto in Nürnberg. Interessantes und Wissenswertes aus den frühen Jahren.“→*90-a Germana Esperanto-Kongreso, Nürnberg, 17.-20.05.2013, Kongressbuch*, p. 31-51.
- Lewis, Rhodri (2007): *Language, Mind and Nature. Artificial Languages in England from Bacon to Locke*. Cambridge: University Press (Ideas in Context 80), 262 p
- LI, Wenwen/ Liu, Haitao (2013): „Language Problems and Language Planning. A corpus-based historical investigation.“→*LPLP* 37 (2013) 2, p. 151-177.

- Libert, Alan Reed (2013): „Theoretical linguistics and artificial languages.“→*History and Philosophy of the Language Sciences*.
<http://hiphilangsci.net/2013/05/29/theoretical-linguistics-and-artificial-languages/>
- Lindstedt, Jouko (2013): „Ĉu lingvoj evoluas simile al biologiaj specioj?“→Amri Wandel, Roy McCoy (2013, Red.): *Internacia Kongresa Universitato. 66-a Sesio. Rejkjaviko, Islando 20-27 julio 2013*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 58-66.
- Lipari, Michela/ Tonkin, Humphrey kaj aliaj (2013): *Belarta rikolto 2013*. New York: Mondial, 91 p.
- Malovec, Miroslav (2013): „Problemoj de pedagogia terminaro en Esperanto.“→ Katarína Nosková, Peter Baláž (2013, red.): *Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj*. KAEST 2012. Partizánske: Espero, p. 103-108.
- Marácz, László (2013): „János Bolyai und das Ungarische als perfekte Sprache.“→Brosch, Cyril/ Fiedler, Sabine (2013, Red.): *Plansprachen – ideengeschichtliche Aspekte*. Beiträge der 22. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23. – 25. November 2012 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 20. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., [117 p.], p. 45-55.
- Maradan, Mélanie (2012): „Scienca Revuo kiel helpilo por esperanta terminologio.“→*Scienca Revuo* 63 (2012), n-ro 228 (1/2012), p. 37-43.
- Maradan, Mélanie (2012): „Plena Bibliografio de 1949-2011“ (de Scienca Revuo).→*Scienca Revuo* 63 (2012), n-ro 229 (2/2012), p. 91-179..
- Maradan, Mélanie (2013): „La esperantologiaj principoj de Eugen Wüster.“→Christer Kiselman, Mélanie Maradan (2013, red.): *Leksikologio, frazeologio, historio, semantiko kaj terminologio: du kontinentoj renkontiĝas en Hanojo*. Aktoj de la 35-a Esperantologia Konferenco en la 97-a Universala Kongreso de Esperanto, Hanojo 2012. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 49-64.
- Marček, Stano (2013): „Esperanto per rekta metodo en 32 lingvoj.“→ Katarína Nosková, Peter Baláž (2013, red.): *Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj*. KAEST 2012. Partizánske: Espero, p. 109-118.
- Markovo, Vinko (2013): „La radikoj de la Plena Ilustrita Vortaro kaj ilia kontribuo al la eduka rolo de SAT.“→Katarína Nosková, Peter Baláž (2013, red.): *Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj*. KAEST 2012. Partizánske: Espero, p. 119-128.
- McElvenny, James (2013): „Otto Neurath’s Isotype and his philosophy of language.“→*History and Philosophy of the Language Sciences*.
<http://hiphilangsci.net/2013/08/21/otto-neuraths-isotype-and-his-philosophy-of-language>
- McElvenny, James (2013): „Otto Jespersen and progress in international language.“→*History and Philosophy of the Language Sciences*.
<http://hiphilangsci.net/2013/05/15/otto-jespersen-and-progress-in-international-language/>
- McElvenny, James (2013): ‘Ogden and Richards’ *The Meaning of Meaning* and early analytic philosophy’.→*Language Sciences* 41.212-221.
<http://dx.doi.org/10.1016/j.langsci.2013.10.001>

McElvenny, James (2013): „International Language and the Everyday: Contact and Collaboration Between C.K. Ogden, Rudolf Carnap and Otto Neurath.“→*British Journal for the History of Philosophy*, DOI: 10.1080/09608788.2013.825761.
<http://dx.doi.org/10.1080/09608788.2013.825761>

Metz, Zdravka/ Fleury, Normand / Lorrain, François (2012): *30 jaroj da agado*. Montrealo: Société québécoise d'espéranto. Esperanto-Societo Kebekia, 138 p.

Miner, Ken (2009): „Situacia aspekto de Esperanto.“
→<http://lingvakritiko.com/2009/10/29/situacia-aspekto-en-esperanto/>

Nguyen, Xuan Thu (2013): „Esperantigo de personaj nomoj kaj loknomoj: la kazo de Vjetnamio.“→Christer Kiselman, Mélanie Maradan (2013, red.): *Leksikologio, frazeologio, historio, semantiko kaj terminologio: du kontinentoj renkontiĝas en Hanojo*. Aktoj de la 35-a Esperantologia Konferenco en la 97-a Universala Kongreso de Esperanto, Hanojo 2012. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 7-13.

Nordenstorm, Leif (2013): „Transpiranto: antisemitism, xenophobia, or just a joke?“
→*Esperantologio. Esperanto Studies (EES)*, kajero 6 (2013), p. 97-108.

Normantas, Vilius (2013): „Sources of text for Esperanto corpora Interpunkcio en EES.“
→*Esperantologio. Esperanto Studies (EES)*, kajero 6 (2013), p. 109-128.

Nosková, Katarína/ Baláž, Peter (2013, red.): *Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj*. KAEST 2012. Partizánske: Espero, 239 p.

Oz, Amos (2013): *Unter Freunden*. Berlin: Suhrkamp, 216 p. (p. 185-216 die Erzählung “Esperanto”)

Panka, Stefan (2013, Red.): *Lexicon silvestre. Vortaro de forsta fako. Esperanto. Nona pars*. Eberswalde: Förderverein “Lexicon silvestre” e.V., 120 p.

Panka, Stefan (2013, Red.): *Lexicon silvestre. Wörterbuch des Forstwesens. Deutsch. Nona pars*. Eberswalde: Förderverein “Lexicon silvestre” e.V., 129 p.

Piškorec, Velimir (2013): „Inter- und Ökologuistik im Vergleich: Ansätze, Traditionen, Schnittstellen.“→Brosch, Cyril/ Fiedler, Sabine (2013, Red.): *Plansprachen – ideengeschichtliche Aspekte*. Beiträge der 22. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23. – 25. November 2012 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 20. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., [117 p.], p. 9-32.

Pleadin, Josip (2013): *Bibliografio de artikoloj aperintaj en „Zagreba Esperantisto“*. Zagreb: Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), 32 S. (2007-2012).

Pokrovskij, Sergio (2010): „Fandi kaj gisi.“
→<http://lingvakritiko.com/2010/02/15/fandi-kaj-gisi/>

Pokrovskij, Sergio (2010): „Muta naturo.“→<http://lingvakritiko.com/2010/04/08/muta-naturo/>

Pokrovskij, Sergio (2011): „Ĉu jes aŭ ne?“
→<http://lingvakritiko.com/2011/06/26/chu-jes-au-ne/>

Prytz, Otto (2013): „La ‚nov-norvega‘ lingvo Nynorsk, lanĉita de Ivar Aasen, kaj la Lingvo Internacia Esperanto, lanĉita de L.L. Zamenhof – similaĵoj kaj diferencoj.“→Amri Wandel, Roy McCoy (2013, red.): *Internacia Kongresa Universitato. 66-a Sesio. Rejkjaviko, Islando 20-27 julio 2013*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 3-13.

Rapley, Ian (2013): „When global and local culture meet.“→*Language Problems and Language Planning* 37 (2013) 2, p. 151-177.

Sadan, Tsvi (2013): „Unu komuna lingvo, multaj malsamaj kulturoj: Problemoj de interkultura komunikado en Esperanto.“→Amri Wandel, Roy McCoy (2013, red.): *Internacia Kongresa Universitato. 66-a Sesio. Rejkjaviko, Islando 20-27 julio 2013*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 33-45.

Sandelin, Bo (2013): *Esperanto. Drömmen om ett världsspråk*. Stockholm: Dialogos, 179 p.

Schnell, Roland (2013): „William Thomas Stead.“→*Esperanto aktuell* 32(2013)5, p.19-120.

Schubert, Klaus (2011): „Optimierung als Kommunikationsziel: Bessere Sprachen.“→ Klaus-Dieter Baumann (red.), *Fach – Translat – Kultur. Interdisziplinäre Aspekte der vernetzten Vielfalt*. Band 1 (Forum für Fachsprachen-Forschungen, (serio red.) von Hartwig Kalverkämper, Band 98), p. 363-392 (Festschrift für Hartwig Kalverkämper) (i.a. bona superrigardo pri planlingvoj).

Schubert, Klaus (2012): „Reducing Otherless.“→Francis Jarman (red.), *Intercultural Communication in Action*. ohne Verlagsort: (USA) Borgo Press, p. 222-231 (i.a. bone pri planlingvoj)

Solis, Adelina (2013): „The Contemporary Esperanto Speech Community.“
→FL-0000-10-00. Fiat Lingua, <http://fiatlingua.org>, Web 01 January 2013, 126 p.

Song, Binghui (2007): „The ideal of Esperanto and the translation of the literatures of minor nationalities into Chinese.“→*Frontiers of Literary Studies in China*, 1 (2007), 2, p. 300-313.

Tellier, Angela (2013): *Dr. John Buchanan – an Esperanto legacy to the University of Liverpool*. Barlaston (Stoke-on-Trent): Esperanto House, 116 p.

Tiĥomirov, Konstantin (2013): „Onomatopeoj kaj interjekcioj en Esperanto.“→ Katarína Nosková, Peter Baláž (2013, red.): *Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj*. KAEST 2012. Partizánske: Espero, p. 147-155.

Tišljar, Zlatko (2013): „La Zagreba Metodo instrui Esperanton.“→ Katarína Nosková, Peter Baláž (2013, red.): *Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj*. KAEST 2012. Partizánske: Espero, p. 157-162.

Tonkin, Humphrey (2010): „Navigating and Expanding the MLA International Bibliography.“
→*Journal of Scholarly Publishing*, April, p. 340-353.

Tonkin, Humphrey (2013): „Traduko kaj originalo en la Esperanto-literaturo.“→*Beletra Almanako* n-ro 17, p. 75-84.

Tonkin, Humphrey (2013): „Esperanto, klarvido, kaj la lecionoj de la historio.“→*Esperanto aktuell* 32(2013) 5, p. 9-11.

Tuider, Bernhard (2013): „Franz Jonas.“ → *La Ondo de Esperanto*, 10/2013, p. 18

Vajs, Ján/ Fajth, L'ubomír (2012): *Esperantisto slovaka – Bibliografio kaj historio 1946-2000*. Partizánske: Espero, 195+3 p (kiel papera eldonaĵo kaj sur DVD).

Van Parijs, Philippe (2013): *Sprachengerechtigkeit*. (el la angla trad. Michael Adrian, Nikolaus Gramm) Berlin. Suhrkamp, 445 p.

Wennergren, Bertilo (2009): „Landanoj, gentoj kaj kategorioj.
→ <http://lingvakritiko.com/2009/06/13/landanoj-gentoj-kaj-kategorioj/>

Witkam, Toon (2013): „Plansprachen: zukunftsgerichtliche Aspekte für das 21. Jahrhundert.“ → Brosch, Cyril/ Fiedler, Sabine (2013, Red.): *Plansprachen – ideengeschichtliche Aspekte*. Beiträge der 22. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23. – 25. November 2012 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 20. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., [117 p.], p. 77-83.

Wunsch-Rolshoven, Louis F. von (2013): „Die Verbreitung von Ideen entsprechend dem Modell „Diffusion of Innovation“ (Everett Rogers), angewandt auf die Verbreitung des Esperanto.“ → Brosch, Cyril/ Fiedler, Sabine (2013, Red.): *Plansprachen – ideengeschichtliche Aspekte*. Beiträge der 22. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23. – 25. November 2012 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 20. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., [117 p.], p. 85-93.

Zamenhof, L.K. (2013): *Du famaj leteroj. Letero al N. Borovko. Letero al A. Michaux, kun francaj tradukoj kaj notoj de André Cherpillod*. Courgenard: La Blanchetière, 51 p.

Zesch, Felix/ Fischer, Rudolf-Josef (2013): *Sonneberger Leitsätze zur Europäischen Sprachenpolitik*. Esperanto-Dokumente 8, Berlin: Deutsches Esperanto-Institut, 48 p.

Zozulja, Boris A. (2013): *Esperanto-Rusa vortaro de “falsaj amikoj de tradukistoj“*. *Ĝesperanto-russkij slovar' “ložnych družej perevodčika”*. Tria eldono, korektita kaj kompletigita. sen loko: Verda Kukolo, 82 p.

8 Libro-ofertoj

8.1 Manuskripto pri Volapük

Bona konanto de Volapuko verkis ampleksan manuskripton pri la lingvo de Schleyer:

“Volapük. Einführung in eine faszinierende Sprache. Birkenau: Hotz, manskribita multobligita manuskripto, 270 p. (2011).

Al interesatoj la aŭtoro donacos la manuskripton:
Gunther Hotz, Tuchbleiche 13, 69488 Birkenau.

8.2 Reduktitaj prezoj por Esperanto-vortaroj por germanoj

La eldonejo Buske (Hamburg) draste reduktis la prezojn por la du grandvortaroj de *prof. Erich-Dieter Krause*:

Erich-Dieter Krause (1999): *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch*. Hamburg: Buske-Verlag, 882 + 18 p.

Temas pri grandega vortaro kun ĉ. 80.000 kapvortoj, ĝis nun la plej granda kaj moderna vortaro Esperanto-Germana. Ĝi i.a. indikas por botanikaj, zoologiaj kaj medicinaj terminoj ankaŭ la latinajn esprimojn.

La prezo ne plu estas **42,00 €**, sed nur **29,90 €**.

Erich-Dieter Krause (2007): *Großes Wörterbuch Deutsch – Esperanto*. Hamburg: Buske, 1.650 p.

Kun pli ol 160.000 kapvortoj kaj parolturnoj ĝi estas verŝajne tutmonde la plej ampleksa dulingva vortaro, kiu entenas la ĉiutagan leksikon kaj fakvortojn el ĉiuj sciencoj.

La prezo ne plu estas **128,00 €**, sed nur **68,00 €**.

9 Korektaĵo pri artikolo en la festlibro por Helmar Frank

En IpI 84-85, p. 16-17 ni prezentis la festlibron por Helmar Frank:

Barandovská-Frank, Věra (2013, red.): Littera scripta manet. Serta in honorem Helmar Frank. Paderborn: Institut für Kybernetik/ Dobřichovice (ĉe Praha): KAVA-PECH, 728 p., ISBN 978-3-929853-18-6, ISBN 978-80-87169-39-1. (41 EUR).

Ĉe la artikolo de Detlev Blanke pri IpI (p. 143-151) erare forfalis jena literaturlisto.

Blanke, Detlev (2006): *Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*. Red. Sabine Fiedler. Frankfurt/M.: Peter Lang.

—(2011): „Planlingvistiko: eta sed riĉa revuo pri interlingvistiko“. In: Irmi Haupenthal/ Reinhard Haupenthal (red.), *Instrui Dokumenti Organizati. Fest-libro por la 80a naskiĝ-tago de Claude Gacond*. Bad Bellingen: Edition Iltis, p. 29-43.

Haupenthal, Reinhard (2012): „Was ist und zu welchem Zweck betreibt man Interlinguistik? En: Andrea Pia Kölbl/Jennifer Bretz (red.), *Zwischen Utopie und Wirklichkeit. Konstruierte Sprachen für die globalisierte Welt*. (Bayerische Staatsbibliothek. Ausstellungskatalog 85). München: Allitera, p.11-32.

Sakaguchi, Alicja (1998): *Interlinguistik. Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden*. Frankfurt/M. : Peter Lang

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 6 33, fakso:+ 49-30-54 98 16 38, detlev@blanke-info.de. Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retroŝto aŭ KD. Artikoloj sen aparta indiko pri aŭtoreco kutime estas kompilitaj de la redaktoro. Represo kun fontindiko estas permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Oni ĉefe bibliografias viditajn materialojn. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj bonvenaj. IpI riceveblas laŭpete senpage de CO de UEA .
